

MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A.


Oomoto

1
9
7
0

Sep.-Okt.

Tokia Domo de Oomoto inaŭgurita

La domkonstruado por la Tokia Centro de Oomoto, kiu daŭris pli ol unu jaron, finiĝis per la kompleta elfaro de kvar domoj en septembro 1970.



Fasado (en parto) de la ĉefdomo de la Tokia Centro

Oomoto

45-a jaro

n-ro sep.-okt.

(363-364), 1970

monata organo de Oomoto kaj Universala Homama Asocio (eldono: dumonata)

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio (por alsendo de abonkotizo, manuskriptoj, informoj, k.s.):

OOMOTO, Kameoka,
Kioto-hu, Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561.

Poŝta ĝirkonto: Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono (1970): 24 steloj (1.70 usona dol.; 6.00 ned. gld.)

Reprezentantoj de Oomoto, ĉe kiuj estas pagebla la abonkotizo, troviĝas en 24 landoj.

Pagebla ankaŭ rekte al la administracio de Oomoto, aŭ al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam -2, Nederlando.

Cirkulas en ĉ. 80 landoj.

AVIZO


Japandevenaj vortoj, kiujn ni de temp' al tempo uzas sen glosoj en ĉi tiu revuo, estas troveblaj en EJ (= *Enciklopedieto Japana*).

Ili estas nome la ĉefdomo kun preĝejo aŭlo, prelegejo, kunvenejoj, akceptejo, administrejo, oficejo ktp; la domo de la gvidantino Naohi Deguĉi, kie ŝi plenumas sian oficon kaj akceptas vizitantojn dum ŝi restas en Tokio; la servodomo kun vendejo de la diversaj eldonaĵoj de Oomoto, k.a.; la pensiono por la laborantoj ĉe la Centro. Al ĉiuj tiuj konstruaĵoj kaj instalaĵoj kune ni montras per la komuna nomo *la Domo de la Tokia Centro de Oomoto*.

La 11-an de oktobro, la Diservo por la inaŭgurado la Domon okazis en la preĝejo kun partopreno de pli ol 2,000 oomotanoj kaj dekoj da eminentaj reprezentantoj de diversaj organizoj religiaj kaj kulturaj. Post la soleno oni vizitis la domon de la gvidantino kaj ricevis ĉanojan regalon.


Por gratuli kaj festi la okazon, la sekvantan tagon oni invitis la famajn noaktorojn, kiuj reprezentas la Kvin Skolojn de Noo. Per sia majstra ludado ili celebris la inaŭguron de la no-scenejo instalita en la preĝejo aŭlo.

La Domo de la Tokia Centro situas tre proksime de la nacia fervoja Stacio Ueno en la japana metropolo. Tie niaj misiaj taskoj kaj taskoj en publikaj rilatoj estas jam komencitaj.



↑ La Inaugura Diservo
en la nova preĝejo
de la Tokia Centro

Monolita monumento
de la Tokia Centro →



ISAAC PITMAN KAJ L. L. ZAMENHOF

— La Duon-sukcesintoj —

Issac Pitman naskiĝis en 1813; 16-jaraĝa li lernis la stenografion laŭ la sistemo de Samuel Taylor. En somero 1837 li komencis konstrui sistemon bazitan sur la sonoj de la Angla. Novembron samjare aperis lernlibro: *Stenography: Sound-hand* (Stenografio: Sonskribo), kvar pencoj. Mallonga tempo de elkovado, sed Pitman multe praktikis ĝin dum kelkaj monatoj antaŭ eldono. La unua provo estis iom skiza, krudatrajta, sekve ĝi estis poste plibonigata de la aŭtoro, kiu cetere transskribis la tutan Bibliion en stenografion.

Ĝis la nuna tempo, jam de post lia morto en 1897, aperis kelkaj modifoj: ekz-e la “Centenary” (1913) kaj la posta “New Era” (1937?) ankoraŭ nun uzata.

Tiel frue kiel en la jaro 1842 Pitman sin okupis pri la reformo de la Angla alfabeto, celante fonetikan, por faciligi lernadon — kun 115 literotipoj! Presaĵoj en lia proponata presotipo aperis en 1844, sed la afero faris malmultan progreson, malgraŭ individuaj laŭdoj.

En 1876-79, tri jaroj, la demando

ricevis iom pli da atento inter kleruloj. Tiam Max Muller, fama filologo, kiu poste aprobis Esp-on, verkis favoran artikolon en “Fortnightly Review”. Li firme kredis, ke en ĉiu skribata lingvo, litera reformo estas, pli-malpli baldaŭ, nepre neevitebla. Sed li timis, ke ankoraŭ generacioj forpasos antaŭ ol tio estos jam plenumita. La obstakloj kontraŭ alfabetareformo estas ĉefe: 1) Mankas oficiala institucio kun ŝtata aŭtoritato, fari aŭ permesi tiun reformon; 2) La diverseco de projektoj alfabetreformaj, kiuj ne interkonsentas pri la plej bona unusola sistemo; 3) Kontraŭemo de edukistoj, eldonistoj kaj industriistoj, jam de universitata nivelo ĝis modestaj presistoj. La edukistoj asertis, ke la reformo detruus eblon rekoni la etimologion de vortoj, pro ŝanĝoj en la literumado. La libristoj kaj eldonistoj timis koston de novaj presotipoj kaj la arkaikiĝon de jam presitaĵo.

En 1879 fondiĝis la Alfabet-Reforma Asocio kun elstare eminentaj membroj, interalie Tennyson, C. Darwin, Max Muller, Prof. Sayce kaj

Gladstone. Sed post unu-du jaroj la afero diserigis en senfruktajn diskutojn pri la fonetiko, anstataŭ floradi per utile praktika laboro, kaj baldaŭ poste la Asocio mortis. La Oxford English Dictionary tamen akceptis tri fonoformojn de Pitman — por SH, ZH, NG.

La stenografio de Pitman estas globvaste uzata ĉie, kie oni uzas la Anglan lingvon. Sed la mondo restis indiferenta al lia fonetika reformo alfabeto. Tamen ankoraŭ hodiaŭ multaj pensuloj asertas, ke fine venos la tempo, kiam la reformo estos necesega, do certe estos farita. En tiu tago la vivlonga laboro de Isaac Pitman partoprenos la rikolton de sukceso longe prokrastita.

Mi aldonas, ke lia nepo Sir *James Pitman*, kiu vizitis Aŭstralion en 1965 aŭtoris sistemon de modifita alfabet-reformo — INITIAL TEACHING ALPHABET (ITA) — uzinda por infanoj anstataŭ la tradicia ortografio. Lia celo estas: Uzi tiun alfabeton kiel *provizoran* metodon, laŭ kiu infanoj povas facile legi sian gepatran Anglan. Kiam ili jam estas flulegantaj, ili pasas senĝene al uzado de la tradicia skribo-presio. Ĝi estas nur ilo, kiun oni poste for-metas, kiam ĝi jam faris sian laboron, plenumis sian celon: helpi infanojn al facila legado.

Tre simpla modifo, uzebla laŭ la

jam havitaj literoj de la alfabeto. Per ĝi la vortoj estas ĝenerale malpli longaj: I=Y, tial IOT=Yacht (jaĥto); Z=Th, tial ZORT=Thought (penso).

El 21,500 infanlernejoj en Britujo proks. 1800 instruas laŭ la metodo Pitmana.

Tio estas la unua parto de la prelego. Mi volas prezenti similaĵon inter la vivo de Pitman kaj de L.L. Zamenhof.

Ambaŭ homojn obsedis du ĉefceloj:

STENOGRAFIO KAJ REFORMITA ALFABETO.

ESPERANTO — NEŬTRALA LINGVO; HOMARANISMO, aŭ HILELISMO, NEŬTRALA ETIKA RELIGIO.

Ambaŭ sukcesis ĉe la unua celo; malsukcesis ĉe la dua. Kiel la stenografio, tiel ankaŭ Esperanto, sukcesis konkeri vastan terenon da uzado — ambaŭ estas globvasta. Alfabeto reformo kaj universale akceptita neŭtrala religio ankoraŭ sin kaŝas en la malproksima estonteco.

Notu, ke Pitman kiel unua bazis sistemon de stenografio sur la sonojn de la Angla: fonetika ĝi estas. Zamenhof kiel unua praktika lingvokreanto bazis sian lingvon sur la ekzistantajn kulturajn lingvojn.

Vi konas ĝeneraltrajte la historion de Hilelismo. Mi do ne ĝin detale

pritraktos. Restas diri nur tion : ke Zam. klare asertis : “La unuigo de la homaro tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo . . . la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo . . . “Hilelismo estas la plej grava el ĉiuj laboroj, kiujn mi iam faris aŭ faros” (“Leteroj de Zamenhof, 199. Vol. 1.”) “La tuta afero E-a estas nur parto de tiul komuna ideo, kiun mi nomas Hilelismo”. Vidu ankaŭ: “Originala Verkaro”, 322; “Nica Lit. Revuo”, 28, 29, 34. “Sennacieca Revuo” 1959; Encik. de E. sub Homaranismo.

Kompreneble malmultaj E-istoj komprenus lian animstaton, lian universalecan sentemon kaj la vast-horizontecon de lia menso kaj spirito. Ilin allogas nur la praktikebleco kaj konkreta uzebleco de la lingvo Esperanto, kiun Zamenhof mem kategorie metis sur nivelon malpli altan ol la alia, la spirite-unuiga koncepto religia, aŭ moral-etika.

Kontraŭis lian Hilelismon la racionalismo kaj la religia ortodokseco — la unua skolo ne amis la en ĝi metafizikajn elementojn, la implicon pri ekzisto de Persona Inteligenta Dio; la dua skolo rifuzis akcepti etikecan, palan regularon al kiu mankas la osto-karno de firme religiaj doktrinoj. Mi citu konfirme : —

“Oni povas malfacile prezenti al

si, kia estis la mirego kaj skandaligo de tiuj Francaj intelektuloj, kun sia kartezia kaj racia spirito kiam ili aŭdis tiun flaman preĝon al ‘la alta morala Forto’ kaj tiun aŭdacan alvokon al unuigo de la eklezioj”. (Waringhien, Leteroj de Z. vol.1, p. 175).

“Zamenhof vere bezonis eceptan naivon, por kredi, ke la rigida dogmaro de la katolika eklezio povus allasi sen kondamno tian herezon, kia Homaranismo”. (same, p.258).

Do Zam. trafis en “krucpafadon”! Ambaŭflanka atako. En tio ambaŭ skoloj misinterpretis la celon de Z. — nome, ke Hilelismo, aŭ Homaranismo, fakte enkorpigis en si nur la vivregulojn de *frateca kunvivado inter homoj kredantaj nesamajn religiojn*. Ĝi celis esti: neŭtrala *religio* simile kiel E-o estas neŭtrala *lingvo*. Religiuoj, adorantaj Dion kun samkredantoj, aŭ private, kompreneble povus fari siajn proprajn ritojn, libere kaj senĝene.

Ekster la du skoloj la cetero de la E-istoj restis pli-malpli indiferentaj al la afero. Por ili “Esperantismo”, aŭ, sinonime, la “Interna Ideo” plene sufiĉis. — “Neŭtrala fundamento, sur kiu la diversaj homaj gentoj povas pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke gentajn apartaĵojn” (Nica L. Revuo 34). Alivorte la plejparto

de la E-istoj volis sin limigi nur al la unueco lingva, ne al unueco religia, pensante ĉi tion iom utopieca.

En la kampoj de lingvo kaj religio povas esti, ke Pitman kaj Zamenhof, kun iom da plaĉo, vidus la disvolvaĵojn de la moderna mondo. Al Pitman plaĉus la simpliga Latinigo de la Turka kaj la Japana (la latinlitera "Romazi" apud la du "kana"-skribsistemoj). Ie mi legis, ke en la moderna Turka alfabeto Latinlitera oni enkondukis la Esperantan cirkumflekson.

Zamenhof salutis la kreskantan toleremon aŭ diskut-volemon inter la diversaj eklezioj, la deziro ĉe ĉiuj flankoj forfroti aŭ kunfandi en konsentita interpreto doktrinajn aspektojn, kiuj dum jarcentoj estis fonto de antagonismo. Jam eldoniĝas Biblio en traduko pri kiu Katolikoj kaj Protestantoj volonte akceptas ĝin. La Vatikano adoptas multe pli mildan sintenon kontraŭ la Judoj, kiujn ili antaŭ pli ol jarmilo kondamnis pro ilia supozita murdo de Kristo; simile kontraŭ Luther la Eklezio Roma eldiras multe pli molan tonon de komprenema interpretado. Flanke de la ne-Romaj eklezioj episkopoj vizitas papojn, invitas Katolikajn klerikojn al siaj preĝbenkoj, kaj predikejoj.

Tamen, malgraŭ tiaj eklumoj de intereklezia harmonio, kaj la malrapida akcepto fare de la nacioj

de plifacile legebla lingvo, restas fakto, ke nek en la unua afero — fonetika reformo alfabeto — nek en la alia — neŭtrala religio aŭ universala etik-regularo helpe akcesora — ankoraŭ venis venko por la du bonfarintoj al la homaro. La historio devas ilin rigardi: duon-sukcesintoj sur ilia du-fronta batalo kontraŭ la homaj malperfektoj.

Nun, mi resumu:

(1) Ambaŭ viroj inventis sistemon en aĝo junula: PITMAN je 24-jaraĝa (unua libreto). ZAMENHOF, 19-jaraĝa (celebro kun student-kunuloj je apero de la unua formo de Esp-o).

(2) Ambaŭ sin direktis sur ĝusta vojo: Pitman — sur vojo fonetika, laŭ la sonaro de la Angla lingvo. Zamenhof — sur vojo *a posteriori*, baze de ekzistanta lingva materialo, deprunte el la ĉefaj Eŭropaj lingvoj.

(3) Ambaŭ frontis opozicion de fortikaj institucioj — edukaj, konvencie kulturaj rondoj.

(4) Ambaŭ havis du vivcelojn, el kiuj nur unu sukcese pludaŭris.

Jen *la similaĵoj de la du vivoj*.

O o m o t o

abonkotizo : 6,00 ned gld.,
1,70 us dol. aŭ egalvaloro

OFERADO AŬ VARBADO

Por pritrakti dum esperantistaj kunsidoj aŭ por traduki en naciajn lingvojn, la du vortoj ne prezentas problemon. Ni nur intencas resumi en ĉiu el tiuj du vortoj de la epigrafo la tutan sintenon de individuo, kiu parolas esperanton, antaŭ la poresperanta movado kaj antaŭ la realo, en kiu disvolviĝas la menciita movado. Ĉiu individuo havas sintenon antaŭ la Internacia Lingvo, submetitan al ĉiuj siaj personaj problemoj, kaŝaj aŭ manifestaj deziroj kaj al motivoj kiuj instigas lin serĉi aŭ soifi iun surfacan aŭ profundan ŝanĝon ene de la socio, en kiu li vivas.

Sed sendube eblas identigi plej specialan dinamikon, ni povas diri, aparte karakterizan en nia movado por tutplaneda lingvo. Tiu dinamiko havas sian historion. Ni ne parolas pri historio de esperanto, sed pri historio de la esperantomovada dinamiko.

Ne eblas koni kaj kompreni tiun historion, ne komprenante la psikosocian historion de la homo mem dum la sama periodo. De la florecej kaj romantikaj idealismoj pasintjarcentaj, kiuj donis lokon unuflanke al serio da Internaciaj Movadoj, inter kiuj

staras Esperanto, kaj aliflanke, al du teruraj kunflagradoj, ankaŭ tutmondaj, ni “evoluis” (se oni permesas al ni tiun manumitan vorton) al mondo tute saturita de utilcel-konkura penso. Hodiaŭa homo (ĝenerale) ne faras, ne pensas, eĉ ne “amas”, se li ne ĉerpas el tio ian “utilon” en la kampo materia aŭ spirita. Ne cerbumante pri la kialoj aŭ implicoj de tia sinteno, nek pri tiaj analogioj kun la idealismoj, ni nur diros ke pro sia propra utilcela karaktero la sinteno ne povas ne lavange minaci la bazojn de movado kiel la esperanta, tia, kia ĝi strukturiĝas kaj manifestiĝas nuntempe.

Nia aktuala dinamiko

La Centra Organizo de la E-movado: Universala E-Asocio (UEA) proponis sekvindajn planojn en nealkuleblaj okazoj.

Estas 3 kategorioj de E-istoj ĉi-prie. 1) Tiuj kiuj *ne povas koni* tiujn planojn ĉar la administraj kondiĉoj de kelkaj landoj malebligas aŭ malfaciligas eniron de eksterlandaj publikaĵoj aŭ ĉar la ekonomiaj individuaj kondiĉoj ne permesas aliĝon al UEA, nek ricevon de la oficiala revuo

“Esperanto” aŭ la “Jarlibron” de UEA (ĉe Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.) 2) Tiuj kiuj *ne deziras koni* tiujn planojn pro tiom da kialoj kiom da E-istoj (Pleje pro indiferento). Ili konsistigas la grandan plimulton de tiuj, kiuj iam lernis la Internacian Lingvon. 3) *Tiuj kiuj konas* la planojn ĝisfunde kaj plenumas ilin (aŭ almenaŭ klopodas) en la tri E-istaj agadbranĉoj: a) Ĉiunivela disvastigo de ideo kaj la fakto de Internacia Lingvo. b) Instruado de E-o kaj kreskigo de la movado. c) Praktika **UTILIGO DE ESPERANTO**.

La realo

Plej granda kvanto de energio kaj mono de E-istaj individuoj aŭ organizoj estas uzata por disvastigo de la “afero” internacilingva kaj por informado pri la venontaj kursoj, se tio eblas. Kiam tiu unua gravega etapo estas kronita de sukceso, komenciĝas la kursoj, ne ĉiam gvidataj de profesiaj instruistoj (kaj pli malbone, kelkfoje gvidataj eĉ de personoj kiuj ne estras E-on). La kursoj ofte ne estas programitaj kaj preskaŭ ĉiam estas makulitaj de impona studentdizerto. Sed en la kazoj, se ili havas sukcesan finon kun diplomdistribuo, konferenco de estraranoj, lunĉo kaj ĉio alia, aperas la problemo “*kion oferti al la kursofininto*”, *kiel li*

utiligu la lingvon. Preskaŭ neniam, kun la fino de la kurso, la lernanto pagas la jarabonon al revuo. Malofte oni informis al li, dum la klasoj, pri la ekzisto de Internaciaj Servoj de UEA aŭ ties Junulara Sekcio Tutmonda (TEJO). Ni diru margene, kaj kvazaŭ flustre, ke ne ĉiam la kursogvidanto konas ĉiujn (aŭ eĉ iun) el tiuj mondaj peresperantaj Servoj, detale priskribitaj en la Jarlibroj de UEA. Inter aliaj: 1) Delegita mondreto (ĉefdelegitoj kaj fakdelegitoj); 2) Koresponda Servo Mondskala; 3) Magnetofona Servo; 4) Programo “PASPORTO” — Internacia hominterŝanĝo (TEJO); 5) Graĵnoj en vento (interlernejaj rondoj). Krome 110 internaciaj revuoj kaj nekalkuleblaj libroj kaj originalaj kaj tradukitaj. Ni aldonu surorele ke la kursogvidanto ankaŭ ne konas la “Principaron de Frostavallen” (Vidu Jarlibron de UEA 1965, paĝo 38). Tiuj estas principoj por unuigi kaj raciigi elementan poresperantan agadon.

La alia dinamiko

Sed ĉio tio, eĉ se konata kaj ekspluatita, ne sufiĉas. Ĉio disvolviĝigas je ne pensebla rapideco. Ĉio ŝanĝigas tiel rapide, ke eĉ tiuj, kiuj deziras kompreni la ŝanĝojn, ne povas “alveni ĝustatempe” por perceptoj kaj realĝustigoj. Homoj interesitaj pri ili mem kaj pri la profundaj homproble-

moj ofte kontaktas E-istajn individuojn aŭ organizaĵojn, sed la plejmulto fine konkludas, post penetra taksado, ke tiuj individuoj aŭ organizaĵoj estas iom *aliecaj* (eksterrealaj) rilate la realon, kiu nin ĉirkaŭas. Alieca signifas: 1) ekster la realo aŭ ne akceptanta la faktojn; 2) freneza. Ili vidas ke la tuta okupateco de E-istaj asocioj koncentriĝas sur informado kaj kursinstruado, en la plej bonaj okazoj, kio nediskuteble necesas, sed... *kio poste?*

Poste, ili trovas sinjorojn kun "tinea esperodoro", kiuj pretendas aligi ilin al "verdeca sekto", aŭ "granda klubo" de malmultaj videblaj membroj kiuj "luktas" por lingvo ne aŭskultata (escepte dum etaj momentoj kaj neniam dum gravaj kunsidoj) eĉ en tiuj kluboj. Uloj aliĝas sed baldaŭ ili enuiĝas pro tiom da "verda afero" kaj fine forlasas porvive tion nekompreneblan kaj konjekte neseriozan. Sed kio estas plej terura: kelkfoje ili elturniĝos por fariĝi eksterordinaraj neidentigeblaj ĉiutagaj malamikoj de la ideo kaj eĉ de la propra realo esperantista.

Renversi la Polusojn

Necesas 4 aferoj: 1) Halti; 2) Pensi en soleco kaj konversacii en grupoj; 3) Kompreni kio okazas; 4) Modifi la dinamikon kaj eble la propran strukturon de la movado.

La E-ista ĉelo (individuo aŭ organizo) devas forlasi la antaŭecon de alieca lingvoinstruado kaj sencela varbado de sensignifaj membroj. La E-ista ĉelo devas restrukturiĝi por oferti la servojn kreitajn kaj kreotajn tie kie tiuj servoj estas necesaj. Tradukservoj plus delegita reto, ktp!

Oni devas malfermi la menson al la "ekstera" realo, kiel unua paŝo cele al la memkapabligo partopreni tiun realon, en kiu hodiaŭ E-o estas kvazaŭ greftita sed senburgona.

La E-ista ĉelo *ne devas atendi* ĝis tiuj Servoj estos petitaj. Ĝenerale ili ne estas konataj, ĉar ili neniam estis ofertitaj "sur la strato mem", sed estis nur la internaj aferoj de niaj asocioj. Oni devas iri en la stratojn, ne por peti sed por oferti. Oferti. Tio implicas serion da profundaj transformiĝoj, kiujn nia movado ne estas preparita alfronti, nek preta realigi. Nia homa spektro havas nur du aŭ tri kolorojn. Nepre ni enirigu la ceterajn ne nur per ĵurnala aŭ televida alvoko, sed per *spontanea allogo*, kiu ŝprucos kiam ĉiu E-ista centro estos fakte utila en la medio, kie ĝi agas. Ni devas multe pli labori kun universitatoj kaj ĉefe kun universitataj gestudentoj, sed nur kun la pozitiva scio, kion ni povas oferti; alie, nia estos kiel ĝis hodiaŭ laboro sencela kaj eĉ kontraŭefika.

Forigi nian rigidecon, nian mas-

kitan sektecon kaj nian aliecon (aŭ ekster-realan sintenon) kaj realgustigi nin al la aktuala situacio, eĉ kun fakuloj kaj per ilia helpo (sociologoj, psikologoj, sociaj laboristoj, instruistoj, seriozaj ĵurnalistoj, ktp) estos inter la plej malfacilaj taskoj, sed plej signifaj, kiujn ni devas alpreni por la bono de la estonteco de Internacia Lingvo.

Komenci denove

Serĉi la faktorojn de tiu restrukturigo, prepari la kondiĉojn por ke ĝi estu stabila transformigo, trovi la organizaĵojn kaj individuojn *ne E-istajn*, kiuj povos ion profiti de Internacia Lingvo, kaj la racia, serioza, planita kaj scienca alproksimiĝo kaj “ektuŝo” al tiuj individuoj kaj organizaĵoj (por doni, ne por peti) – jen estas la tasko, kiu koncernas, kom-

preneble, la E-istojn mem, ĉiun el ni.

Ni ne nur petu gelernantojn aliĝi al E-o. Ni serĉu tiujn, kiuj bezonas E-on, ni ofertu ĝin per nia propra strebado kaj ni elmontru ke ĝi *utilas*. Nur tiam ekaperos gelernantoj ne alvokitaj. La tasko estas longa, peza kaj ŝajne senfrukta, sed ĝi estos la sana radiko de potencaj fruktarboj. De tio dependas ke ni daŭrigu la malrapidan progreson. Ni jam komencu eraon de fundamentitaj atingoj kaj reala disvolviĝo. Kio estas plej pozitiva en la E-ista movado estas la interna forto, kiu permesis transcendi la ripetitajn dissplitigojn pro du grandaj mondomilitoj. Kio estas plej negativa estas la persistemo uzi malnovajn metodojn (eble pro tio ni ankoraŭ pioniras) kaj la adaptomanĝo al novaj cirkonstancoj, al la loko kaj al la epoko, en kiu ni vivas.

Enciklopedieto Japano

5 us. dol. aŭ 18 ned. gld.

La Libro de Teo

2.5 us. dol. aŭ 9 ned. gld.

Mendu al *Universala Esperanto-Asocio*

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002

Nederlando

D-ro Frantisek Polanský :

PRI LA TOMBO DE J. A. KOMENSKY

La tutmondaj celebroy de J. A. Komensky daŭras. En 1957 la tuta mondo rememoris, ke forpasos 300 jaroj ekde la unua aperigo de la verkaĵo de Komensky "Opera Didactica Omnia" (Amsterdami, Christophorus Cunradus et Gabriel de Roy 1657), en kiu estis prezentita al la tuta mondo baza verkaro pedagogia de nia ĉeĥa pedagogo kaj precipe la "Didactica Magna", la fundamenta verkaĵo de tutmonda pedagogio.

En 1958 okazis la 300-jara jubileo de alia unua aperigo de majstra didaktika verkaĵo de Komensky "Orbis Pictus". Temis pri unua bildlernolibro en la mondo, kiu aperis la unuan fojon el la manoj de la pre-sistoj Endter en Norimberko en 1658. Tradukita en multaj lingvoj kaj en 300 eldonoj, ĝi servis pli ol du jarcentojn eble en ĉiuj lernejoj de kulturaj popoloj, kiel la plej disvastiĝinta en la tuta mondo lernolibro lingva kaj tiu de universala kleriĝo.

En 1966 en Praha finfine aperis la ĝis nun nekonata monumenta filozofia verkaĵo "De Rerum Humanarum Emendatione Catholica". La Tutmonda Kongreso de Komeniologoj

taksis en 1967 en Olomouc tiun ĉi verkaĵon kaj konkludis, ke Komensky per tiu verkaĵo pruvis, ke li ne estis nur pedagogo, sed precipe elstara filozofo, kiu per sia filozofio penetris en ĉiujn fakojn de tiam konataj sciencoj kaj strebis atingi korekton de ĝenerala degenerado de homa societo.

En tiu ĉi jaro en plej profunda estimo ni rememoros 300 jarojn de dolora vivokuro kaj morto de la "Instruisto de la Nacioj", kiel Komensky estas ĝenerale nomata kaj estimata. Liaj verkaĵoj estas ĉiam aperigataj en la lingvoj de kulturaj popoloj, la torĉo de profunda scienco brilas eĉ ĝis niaj tagoj. La Tutmonda Packonsilantaro vicigis jam pli frue Komensky inter la celebratajn geniulojn, kiuj per siaj verkaĵoj kontribuis al edifo de la homo; unesko proklamis tiun ĉi jaron kiel la "Internacian Jaron de Eduko" kaj denove okazos celebroy omaĝe al la scienculo en la tuta mondo.

Ni enpenŝigu super la lastaj tagoj kaj destino de lia longtempe forgesita tombo.

La lastajn 14 jarojn de sia mal-



J.A. Komensky

trankvila vivo Komensky pasigis en Amsterdam, kien li rifuĝis en 1656 post incendio de pola urbo Lešno, lia iama loko de aktiveco. La pereigaj flamoj neniigis ĉiun lian proprajon, multnombrajn librojn kaj valorajn manuskriptojn : per fuĝo la familio savis nur sian vivon. En la plej malfacilaj momentoj la familio de nederlanda vendisto de Geer proponis al Komensky gastamecan azilon en Amsterdam, kie li finpretigis kaj redaktis sian vivverkaron. Sed la doloro, la paralelo de lia tro trista vivo-kuro, lin ne forlasis eĉ dum tiuj ĉi jaroj.

El la korespondaĵo de Komensky videblas, ke dum la 2 lastaj jaroj li tre grave malsanis kaj longajn semajnojn li estis devigita kuŝi en la lito. La 15-an de novembro 1670 en sia 78-jaraĝo li mortis. Post unu semaj-

no li estis enterigita en proksima Naarden kaj per la dato de lia enterigo la historio de Komensky por ĉirkaŭ 150 jaroj fermiĝas.

La sciigo pri la morto de Komensky ne skuis la spiriton de ĉeĥa popolo. En nia patrujo tiam nur tre malmulte da homoj konis lian nomon. Nur la ĉeĥa historiisto Palacky per mallonga biografio en 1829 vivigis intereson pri Komensky. Pli poste, sekve de feliĉaj kaj bonŝancaj malkovroj de pluaj manuskriptoj kaj verkaĵoj, pri kiuj Palacky ne sciis, kaj kun kreskanta konsciiĝo pligrandiĝis eĉ la intereso pri Komensky kaj tute eksterkutime pri la forgesita tombo.

Unua ĉeĥo, kiu jam en 1839 serĉis la tombon, estis la poemverkisto Jan Erazim Vocel ; ĝuste en Naarden, sed en dua naardena preĝejeto, tiel nomata Preĝejeto de S-ta Vito. Nek la pastoro, nek la preĝejservisto povis doni eĉ la plej sensignifajn novaĵojn. 35 jarojn pli poste Instruista Organizaĵo BUDEĈ organizis novajn preparojn okaze de la migrado al la tombo de Komensky. La demando, per kiu la geinstruistoj turnis sin al la urbestro de Amsterdam, vekis intereson ne nur pri la tombo, sed ankaŭ pri la verkaro de Komensky. En tiuj ĉi tagoj la notario en Naarden de Roeper trovis la tiel nomatan "Registron de

la tomboj”, en kiu estis enregistritaj la nomoj de la mortintoj enterigitaj en pasinteco en 51 tomboj en malgranda preĝejo, nomata “Valona”, kiu pro malsufiĉo de valonaj civitanoj de sia religio jam delonge estis nuligita — jam antaŭ la alveno de Vocel. Ĝi estis ŝanĝita je malgranda fabriko kaj pli poste en parton de kazernoj. Apud la tombo n-ro 8 estas mencio, ke la 22-an de novembro 1670 estis en ĝin enterigita Komensky.

La novaĵo enpenetras la patrujon, ĉi tien migras multnombraj adorantoj de Komensky kaj sciencexplorantoj pri lia verkaro, sed iliaj migradoj restis ĉiam vanaj. La tombo estis nekonata kaj kaŝis ĝin sekreto.

La unua mondmilito forŝovis iomete la intereson pri Komensky, pri lia tombo, sed baldaŭ post ĝi la intereso grandiĝas. Oni elserĉas la novaĵojn pri lia vivo kaj pri la sorto de lia tombo. En eŭropa gazetaro aperas novaĵoj tre maltrankviligaj. Unu el la germanaj ĵurnalistoj skribis en

1925, ke li vidis multe da tomboj de elstaraj personecoj en trista stato, sed tiom malhonorigitan tombon, kiun piedpremis ĉiutage la botoj de soldatoj, li ankoraŭ ne vidis. Tiam li akuzis Ĉeĥoslovakon Respublikon, ke ĝi ne zorgas pri la tombo de sia elstara scienculo. Ĉeĥa raportisto Egon Ervin Kisch ankaŭ ekmigris al Naarden, iamanire aperis en la lokoj de la kazernoj kaj konstatis, ke la kapelo, en kiu Komensky estis enterigita, estis ŝanĝita je militmalliberejo. Artikoloj de nederlanda kuracisto d-ro Oosterhuis eksterkute trafis la konsciencon de ĉeĥa popolo. “Kiam venos la tempo”, skribis li tiam, “ke tiu ĉi forlasita tombo estos ornamita per floroj! Ĉar malgraŭ sia ruiniĝo ĝi estas simbolo de nova vivo. Ne plu toleru, ke la tombon de Komensky piedpremu la botoj de la soldatoj!”

Ĉeĥa publiko estas incitita kaj ĉagrenita, la registaro aranĝas preparojn por malkovro de la tombo de Komensky. Por la tasko estis komi-



El la lernolibro “Orbis Pictus” de J.A. Komensky

siita la antropologo de Karolo-Universitato, profesoro d-ro Matieg, kiu post interkonsento kun nederlandaj oficistaj agantoj alpaŝis la eltombigajn laborojn en 1929. Kunlaboris nia arĥitekto inĝeniero Sochor kaj nederlandaj antropologoj, universitataj profesoroj d-ro van de Broek kaj d-ro Kleinweg de Zwaan. Estis necese malfermi multajn tombojn, efektivi precizajn mezuradojn kaj identigi la ĉirkaŭajn tombojn, ĝis ili sukcesis atingi la tombon sub n-ro 8. Tiu ĉi estis en netuŝita stato. Ŝajnis, ke la malkovro estas ĝusta. Aperis scienca raporto pri ĝi kaj la nederlanda registaro decidis, ke la preĝejo estos dediĉita (kun la tombo de Komensky) al nia ŝtato, kiu havos absolutan liberecon de decido, kiel aranĝi ĝin ekstere kaj interne. La arĥitekto Lad. Machoň, la skulptistoj Horejc kaj ŝtipl kaj kune ankaŭ la pentristo Benda dum kvar jaroj restaŭris la kapelon, kiu estas ornamita per belartaj de la skulptistoj, pentristoj. La kapelo estis ŝanĝita je maŭzoleo. La verkaĵoj simbolas la nacian kaj tut-homaran signifon de Komensky. La kapelo estis ŝanĝita je maŭzoleo. La pezocentro de la maŭzoleo estas la propra tombo, indikita en la pavimo per diorita ŝtonplato. Apud la tombo estas granda bronza kandelingo, el kiu supre malfermiĝas tri manoj tenantaj la kandelon. Sur unu loko

troviĝas ĉeĥoslovaka ŝtata insigno.

Festene la maŭzoleo estis en 1937 transdonita al la tutmonda publiko. Daŭris 267 jarojn, ĝis “la Instruisto de la Nacioj” atingis sian lastan ripozlokon. En jubileaj jaroj estis en Naarden instalita impona statuo de Komensky, verkaĵo de nacia artisto Vincenc Makovský kaj reinstalita ĉe nialanda Muzeo de Komensky. Nia popolo pagas sian malnovan ŝuldon nun al sia granda filo.

Al Naarden ĉiujare migras ekspedicioj de la adorantoj de Komensky el tuta Eŭropo kaj precipe el la patrujo de Comenius.

Dufoje al mi, la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, la bonŝanco ebligis havi la honoron propramane meti la florojn apud la tombo de la unu el la plej elstaraj instruistoj de la mondo, de granda humanisto kaj batalanto por la tutmonda paco! Mi estos eksterkutime feliĉa, se mi ankoraŭfoje havos la saman okazon.

Tradukis: Jana Čichová (Praha)

daŭrigo de p. 146

Unu vintran matenon Teofi kun miro ekperceptis ke sur la branĉeto fiksita en florpoto sidis granda papilio kun bele kolorigitaj flugiloj, ruĝeflavaj...

— Mizerulo! — diris karese al li — Tia frosto ekstere... restu ĉi tie! — kaj li restis...

Blanka Tigro

(ĉina fabelo)

Kiomfoje Somi iradis al foirejo, tiomfoje akompanis lin malagrabla susuro. Ĉu tiel susuris ruĝa folio de acero, kiu komencis sterniĝi la vojeton el domo tra ĝardeno ĝis ne fora foirejo? Videble jam ekis aŭtuno, kaj aŭtune, oni diras, aperadas ofte Blanka Tigro kaj atakas rapidantajn homojn. Somi duone kredis, duone ne, kaj diris al sia edzino, Teofi:

—Persekutas min iu malagrabla susuro. La tutan vojon al foirejo...

Teofi, kiu estis tre saĝa, ekridetis.

—Ĉu vi ne scias? Alvenis aŭtuno kaj susuras la velkintaj folioj. Ĉu tio estas tiel mirinda? Ne estu superstiĉa!

—Sed tiu susuro ne estas kutima. Sonas simile al iu ŝtelkaŝa irado... al iu insido...

—Insidi vin?! tian stultulon!

—ridis Teofi.

Sed en ĉiu kazo mi faros magiaĵojn, kiuj ne estos superstiĉaj, ĉar faras ilin ankaŭ kuracistoj. Do ne timu!

En la foirejo la bruego surdigis ĉiun susuron, homamasoj svarmis, estis bone kaj sekure; Somi babiladis

gaje kun kunuloj-vilaĝanoj, trinkis unu glaseton da rizbrando, poste duan... en gaja humoro kaj sur malcertaj piedoj revenadis hejmen. Tiam... sur la vojeto kondukanta al domo inter jasmenaj arbustoj la susuro fariĝis laŭte aŭdebla; Somi ekrigardis: antaŭ li sidis sur flava sablo granda besto, Blanka Tigro! Somi deprenis ĝentile la ĉapelon (sentis nenian timon!)

—Bonan vesperon! Vi estas Blanka Tigro?

—Mi estas—ekmurmuris la besto—mi longe hodiaŭ vin atendis!

—Eble... la foiro, intereso tro longe min okupis... Kion vi deziras de mi?

—Bagatelon! Mi volas prunti de vi la korpon. Mi supozas ke vi ne rifuzos? Via korpo estas por mi tre bezonata...

—Neniam! Mi pruntedonos mian korpon al neniu!

—Tamen pripensu... vi ricevos grandan premion! Senigita de korpo vi eniros la palacojn kaj nevidebla ludos gravan rolon penetrante la konsciencojn de vivantoj...

—Kaj mi estos senviva? Mi preferas resti kun mia propra korpo!

—Sed via korpo estas malsana, malforta.

—Do kia profito por vi?

—Ne rezonu! Elsaltu tuj de la korpo!

Somi volis ion respondi, sed ne sukcesis. Densa nigra vualo kovris la okulojn. Post, ĉu post unu sekundo, ĉu post unu jaro (li perdis tute tempo-senton) li komencis vidi, sur nigra fono, ruĝajn punktetojn. La bildo pliheliĝis kaj li ekperceptis sin mem kuŝantan sur la lito, senvivan kaj apud la fenestro sian edzinon plorantan. Por ŝin iel konsoli li alpaŝis kaj diris:

—Teofi, ne ploru! Mi estas ĉi tie...

Sed Teofi ne aŭdis, ŝi daŭre ploris kaj ne vidis lin. Ĉagrenita deturnis sin. Stranga afero! Li mem sentis sin iom malcerte, nenature... kial Teofi lin ne vidis? Kio okazis? El ĝardeno alvenis lia dorlotita kato. Ĝi komencis froti silkan pelton je liaj piedoj kaj murmuris tre kontenta... kia ĝojo! Do estas viva! Se la kato lin vidis, kial Teofi ne? Kaj ne nur ŝi, sed ankaŭ la najbaroj kiuj vizitis lian domon... Al neniu bezonata li vagis tra domo kaj ĝardeno. Fine sentis sin laca kaj eksidis sur la ŝtupoj antaŭ domo.

Krepuskiĝis... falis ruĝaj folioj

de acero kaj surŝutis lian kapon. Li komencis dormeti...

Subite ekbrilo de glavo lumigis mallumon antaŭ liaj okuloj. Somi ekvidis nigran armilon kaj altan figuron de Batalisto. "Nigra Batalisto"! Somi ekmemoris ke en sia infanaĝo li aŭdis pri Nigra Batalisto. Tiu estas nepardonema, senkompata kaj kaptas homajn animojn por ĵeti ilin en inferon... La glavo tuŝis ŝultron de Somi.

—Iru!

Somi leviĝis laŭ ordono, la glavo montris la direkton. Ili iris longan tempon en silento, la vojetoj volviĝis antaŭ ili, pereadis kaj denove elmergiĝis... la irado estas senfina... Somi per tremanta voĉo aŭdacis interrompi la silenton:

—Diru, nobla Sinjoro, kien vi min gvidas?

Batalisto ekstaris kaj unuafoje enrigardis en la okulojn de Somi. Li ektremis. Ne pro timo, sed pro senlima ĉagreno, kiu videbliĝis en la okulkavoj de Batalisto kaj en tuta vizaĝo. La ĉagreno estis profunda, superhoma, kaj ne tera. Ĝi permesis al Somi mezuri en unu momento sian propran malsuprenfalon. Li staris antaŭ Batalisto tremanta, sendefenda. Ĉagrene severa rigardo daŭre penetradis la animon de Somi.

—Vi demandas... vi ne scias, kompatinda, ke ĉiu "kien" estas por vi

la verdikto—la voĉo de Batalisto estis solena.—Ne mi vin kondamnas. Sed vi mem. . .

—Mi estas preta penti. . .—Somi diris tion tra klakantaj dentoj.

—Penti ! Unusola rimedo, unusola respondo al ĉiuj postuloj de mondoj ! Kaj pro tio estas tiom da bagatelaĵoj en kosmo . . .

Batalisto eksilentis. Somi jam supozis ke li konsideradis diversajn specojn de pento por li, kiam subite enigma gvidanto etendis armitan brakon : antaŭ ili elkreskis rapide fajreca vando kiu plenigis tutan spacon. Oni aŭdis en ĝi voĉojn de ĉiuj estaĵoj koncentritaj en unu superbelan simfonion.

—Ĉu vi povus diri ke vi iel kontribuis al tiu plena simfonio de tri mondoj ? Ke vi ion donis el siaj fortoj, el siaj energioj por ke la unueco realiĝu ?

—Mi . . .—Somi longe pensis; oni devas respondi malgraŭ ke la demando ne estis tute komprenebla — Mi . . . mi amis . . . mi amis mian edzinon !

—Mia servisto kaj amiko, Blanka Tigro, forprenis de vi la korpon, ĉar naive pensis ke vi estos utila al mi. Tiel ne estas. Vi estas utila por nenio. Eĉ unu paŝon vi ne faros antaŭen . . . fajreca vando ordonas al vi la retreteton ; vi restos . . . sur via limo por eterne. . . Se en vi vekigi la deziron de vivo, vi renaskiĝos, tamen ĉiam

limigita, ĉiam sub povo de Blanka Tigro. Pasos multaj epokoj ĝis via konscia paŝo antaŭen.

—Se mi promesos esti en estonta vivo pli bona ?

Batalisto longe silentis, kvazaŭ forgesis pri ekzisto de Somi.

—Mia naiva amiko, Blanka Tigro — li diris post paŭzo — ne distingas inter bonaj kaj ne-bonaj. . . li kalkulas nur pezon de la korpeco, se iu estaĵo estas tro ŝargita per la korpeco, li liberigas ĝin . . . forprenas la korpon ; faro plene kompatema, ĉu ne ? Liberigitaj tamen ne estas kontentaj, ne profitas sian liberon. . . estas surdaj kaj mutaj antaŭ voĉo de la spirito. . . Kion fari kun ili ? — Batalisto denove enpensiĝis.

Subite li etendis manon sur kiu sidis granda papilio kun pale koloraj flugiloj.

—Prenu ĝin ! Tio estas donaco de nesondeblaj mensaj abismoj, (sur randoj de ili kuregas Blanka Tigro). Mia amiko neniam tuŝos ĝin. Ĝiaj flugiloj nun estas palaj, sed ili alprenos kolorojn de viaj sentoj. Estu por vi tio la konsolo !

Nigra Batalisto malaperis. La papilio eksidis sur la ŝultro de Somi, kiu eksentis grandan emon al ploro. Tute sola, sola en ĉiuj mondoj, en la universo ! Nek voĉo, nek iu ajn vizaĝo, nenio ! La vakuo . . .

(daŭrigo al p. 143)

Ideoĵ

Esti H O M O

en principa kaj dum jarcentoj valida senco,

estos neniam eksmodaĵo

ĉe sanaj, kapablaj, fortaj nacioj !

Ĉar ja ĝuste en la HUMANECO estas la plej granda FORTO,

la plej solida bazo de ĉiuj leĝoj —

la humaneco kreis la mondkonatajn elstarajn verkaĵojn. . .

ĉiam ekde pratempoj ĝi estis lakto de geniuloj . . .

La homaron ĝi edifis,

ĝuigis kaj varmigis,

ĝi fariĝis fonto de freŝeco kaj fortoj —

al kiu la HUMANECO estis super ĉio kara,

neniam li malesperis

kaj neniam eraris.

Kiu al ĉiuflanka humaneco siajn pensojn,

kapablojn kaj fortojn ĉiutage dediĉas,

tiu la komprenemon, kunlaboron kaj PACON de l' homaro

p l e j b o n e subtenas.

Tradukis : Jana Čichová (Praha)

(daŭrigo de p. 160)

sante la preĝadon kaj sanktajn mesojn.

“Do, bone, ankoraŭ hodiaŭ vi pagu al la pastro por bezonaj sanktaj mesoj kaj same varme preĝu. Se vi ne plenumos tion hodiaŭ, mi trovos vin!”

Johano, preskaŭ fluge atingis la preĝejon kun ĝojiga novaĵo. Leono deprenis la pecon da karno kaj diris: “Ankoraŭ ĉi foje ci havis feliĉon, sed nun forkuru, ĉar lastaj sekundoj jam estas”. Tion dirinte, li malaperis.

Apenaŭ Johano forlasis la preĝe-

jon, ekbatis la unua kaj peze fermiĝis la pordego. Kun resto de kuraĝo, kaj pli da scivolemo, li postkuris Leonon, por vidi kion li faros alveninte al la edzino. Ĝustatempe li venis por vidi, kiel eniras en la tombon Leono, kisas la edzinon, kaj la mistera lampeto estingiĝis. Antaŭ li kuŝis nur ordinara tombo. Ankoraŭ momenton impresita, Johano rigardis kaj nur nun konsterniĝis, ke preskaŭ estus perdita lia vivo pro stulta fanfaronado.

Aliĝu al la Secubun-festo de Oomoto

per alsendo de hitogatoj

Karaj gefratoj !

Same kiel en la pasintaj jaroj ni invitas vin partopreni per alsendo de hitogatoj la Secubun-Feston de Oomoto, kiu okazos tra la nokto inter la 3-a kaj 4-a de februaro 1971 en la Mirokuden-Preĝejo, Ajabe.


La vorto *Secubuno* signifas la “ŝanĝiĝon de la sezonoj” : ĝi markas la finon de vintro kaj la komenciĝon de printempo (4 feb.) : ĝi estas la antaŭvespero de Riŝuno aŭ la tago de ekprintempigo laŭ la luna kalendaro, kiam la ekliptika longitudo aŭ la angulo de la suna orbito rilate al la ekvatoro atingas 315 gradojn. La japanoj celebras la Secubunon tra la lando ĉe ĉiuj tradiciamaj familioj kaj jaŝiroj — kun la folklorkreda rito de ekzorcado, kaj tiel ili eniras la novan sezonon aŭ “novan jaron”.

La *Secubun-Festo de Oomoto* havas, krom tio, aparte gravan signifon, ĉar ĝuste je la tago de Riŝuno en 1892, la Prapatra Dio manifestis sin per Nao Deguĉi, la fondintino de Oomoto, por anonci, ke “revenis la tempo por Dia Regado” kaj ke, post reformado de la mondo, la homaro eniros en Novan Epokon. Do, la

Secubuno estas unu el la plej gravaj jareventoj de Oomoto por purigado de ĉiuj niaj pekoj.

La Secubuna rito de Oomoto estas plenumata en du partoj : unu estas la Purigado al la Universo kaj ĝi okazos de 19:00 ĝis 20:30 de la 3-a, kaj la alia estas la Purigado de la individuaj personoj, kiu daŭros pli ol sep horojn ĝis la aŭroro de la 4-a. La Purigado de individuaj personoj estas plenumata per hitogatoj.

Hitogato laŭvorte estas “hom-figuro” farita el japanpapera slipo en kimona formo. Ĉiu partoprenanto surskribas ĝin per siaj nomo, aĝo kaj adreso. La hitogatoj tiel surskribitaj de *milionoj da homoj* el ĉiuj partoj de la lando kolektiĝas en amasoj ĉe la Oomoto-Centro. Oni metas ilin sur la altaron de la Mirokuden-Preĝejo, Ajabe. Tie okazas la soleno kaj preĝo por peko-purigado al ĉiuj homoj aliĝintaj per hitogatoj. En la daŭro de la tranokta recitado la preĝvortojn far miloj da oomotanoj, la kolektitaj amasoj de hitogatoj disiras de la altaro al la ducent geservantoj, kiuj deklamas la personajn nomojn unuope de la hitogatoj kaj enmetas ilin



unu post unu en argilajn potojn. Cent servantinoj, nomataj “seoricuhime”, procesie forportas la potojn al la rivero Ŭaĉi, kie la diservantoj de sur la ponto ĵetas la hitogatojn en la riveron. La hitogatoj forportas ĉiujn niajn pekojn.

Al kelkaj tio ŝajnus simbolisma rito de peko-purigado, al multaj aliaj — nur superstiĉo. Sed por tiuj, kiuj scias la rolon de konkreta *formo* kiel esprimilo de la spirito, ĝi estas grave realisma.

Kiuj konsentas kun tiu nia kredo kaj kiuj interesiĝas en tiu ĉi rito, volu surskribi kun via preĝo la enmetitajn hitogatojn per la nomoj, aĝoj,



- ↑ Parto de la hitogatoj senditaj el eksterlando.
- ← La diservantoj ĵetas hitogatojn en la riveron Ŭaĉi.

(ne-nepre) kaj adresoj (urbo/lando) de vi, viaj familianoj kaj amikoj. Se la hitogataj folioj ne sufiĉas, volu multobligi ilin el via papero, kaj sendu ilin ĉiujn tiel ke ili atingos nin ĝis la 31-a de januaro 1971. Ni atendas la alsendon de viaj hitogatoj en kiom eble plej granda nombro. Spirite — nepre partoprenu la solenon kaj preĝon je la ĉi-supre menciitaj horoj! La purigado de ĉiuj niaj pekoj estas la nepra kondiĉo por Mondpaco.

Sincere viaj
La Administracio de Oomoto
 Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

Waitakere-Montetaro en Nov-Zelando


La Pacifika Oceano eniĝas de oriente en la nordan parton de Aŭklando kaj la Tasmania maro de okcidente en la sudan parton de la urbo ; la maro estas videbla ĉiuflanke de la urbo. Estis la somero, kiam mi vizitis la urbon. Sed la varmo ne estis tiel intensa kiel en mia lando. La vetero kutime estis ŝanĝema, kaj mi ĉiam devis kunporti ombrelon. Tamen, en la tago kiam Prof. Millener afable kondukis min tien per sia

aŭto, la ĉielo estis eksterordinare serena. Li gvidis min unue al la monteto Eden (634 futoj), de kie mi povis rigardi kelkajn montetojn, malgrandajn vulkanojn estingiĝintajn. Norde troviĝas monteto de la Aŭklando-muzeo, oriente la monteto Hobson, okcidente la monteto Albert kaj sude la “Unu-arba Monteto” (603 futoj), la plej granda inter ili, sur kies pinto staras granda radiata-pino (*Pinus radiata*) kaj granda monumento de Sir John Logan, fondinto de la urbo. La montetoj estis iam fortikaĵoj de maorioj.

Post 15 minutoj da aŭtado ni atingis la vilaĝeton Tirangi. Estis ĝuste la 10a ; ni ripozis por mallonga tempo kaj trinkis teon. La profesoro parolis pri la salajro de laboristoj de la lando : Oni pagas minimume \$ 40 po semajno (\$1 ĉ. 403 enoj). Se oni mezuras ilian vivtenadon per la prezo de cigaredoj, la cigaredoj egalekvalitaj al nia “Hope” kostas 130 enojn po skatoletto, nome 30 enoj pli karaj ol la “Hope”. Tial la laboristoj ne estas pagataj tre alte kompare kun tiuj en mia lando.

La loko estas la enirejo al la






La pluv-arbaro intermiksita kun podokarpoj laŭ la turima vojo en la Waitakere-Montetaro.

Waitakere-Montetaro, konsistanta el multaj montetoj pli ol 1,000 futojn altaj, kaj profundaj valoj. Estas supozeble, ke antaŭ la alveno de eŭropanoj la grundo de tiu regiono estis kovrita de pluv-arbaroj (Rain forests) intermiksita kun podokarpoj, tre populara specio, *Beilschmiedia tawa*. Sed escepte de kelkaj lokoj apud la Waitakere-akvorezervejo, la tieaj arbaroj jam delonge estis entute hakfaligitaj kaj forbruligitaj. Tial dum la lasta jarcento la arbara pejzaĝo tute perdis sian karakterizan aspekton. Laŭlonge de la turismaj vojoj oni

tamen ankoraŭ povas observi diversspecajn filikojn, podokarpojn, kaŭriojn, ktp., tipajn kreskaĵojn de la praarbaro. La malaltaj kreskaĵoj de la arbaro konsistas el multaj specioj de filikoj, arbofilikoj kaj abundaj specioj de la rampantaj kaj epifitaj plantoj. Jen kio estas la rimarkinda, karakteriza trajto de la pluv-arbaro.

Ambaŭflanke de la turisma vojo oni vidas la blankajn florojn de la hebeo ("Hebe"). Pli ol 90 specioj de la genro distribuiĝas en Nov-Zelando, nur du en Suda Afriko kaj unu en Aŭstralio. En Nov-Zelando oni povas trovi ilin ĉie, de marbordo ĝis altaj



Kvar specioj de "Hebe" (el Poole and Adams)

montoj; ili estas ordinare malaltaj arboj, sed en altaj montoj globformaj. Multaj varioj troviĝas en la genro, eĉ interne de unu specio, kaj krome iliaj naturaj hibridoj; tial oni povas facile kolekti pli ol dek specioj, eĉ en areo de kelkaj kvadratmetroj.


Ni alvenis ĉe la Kaskado-parko en la norda angulo de la montetaro; tie staras unu granda arbo de kaŭrio. En la suba flanko de Waitakere-Rivero, kiu fluas tra la parko, troviĝas tipa pluv-arbaro; junaj kaŭrioj kun arĝentverdaj trunkoj rekte staras super la altaj arboj de la arbaro.

Ni tie tagmanĝis. La sandviĉoj, kiujn la profesoro kunportis, estis speciale preparitaj por mi. Li detale klarigis al mi pri la materialoj, kiujn li uzis. Mi atente gustumis pecon post peco kaj trovis ilin tre bongustaj. Sed li diris: "Hinda studento, kiu iam vizitis lin, forĵetis la sandviĉojn de li preparitajn, ĉar ili estis kontraŭ lia gusto". Kaj li elprenis el la kesto jen nigran teon, jen kafon, jen

verdan teon, parolante al mi, ke la banano de Figioj estas pli bongusta ol tiu de Ekvadoro, ktp. Mi manĝis kun bona apetito kaj kun elkora danko, rigardante la majestan kaŭrion antaŭ mi.

Parenteze, mi volas aldoni, ke la profesoro invitis min je du okazoj kaj regalis min per manĝaĵoj speciale kuiritaj de li mem. Sed ĉiufoje ilia gusto ne plaĉis al mi ĉar ne kutima al mia palato. Mi demandis lin, kiel li gustigis ilin. "Per ŝerioj", li kontente respondis. Mi informiĝis, ke li estas membro de la komitato pri gustumado de ŝerioj. Lia patrino mortis en lia juneco kaj li devis kuiri por siaj gefratoj, kio faris lin bona kuiristo.

Post la lunĉo ni iris al la okcidenta marbordo, kie sin ĵetadas la furiozaj ondoj de la Tasmania maro. Sur la dunoj kreskas strangaj dunplantoj: Plej proksime al la maro la cipero (*Desmoschoenus spiralis*), kaj ĝin sinsekvas la graminacoj (*Spinifex hirsutus*), la lekanteto





Brasik-arbo (el Poole and Adams)

(*Cassinia retorta*) kaj la lupino (*Lupinus arboreus*); apud la vojo la formio (*Phormium tenax*) kaj plej malproksime de la maro la agavo (*Cordyline australis*).

La malhele verdaj folioj de la formio estas ĉ. 2 m. longaj; el iliaj fortikaj fibroj oni faras ŝnurojn. La flortigo estas ĉ. 5 m. longaj kaj portas

multajn malhele ruĝajn florojn 2.5~5 cm longajn. La stamenoj kun flavaj polensakoj pendas el la petaloj eksteren kaj sekrecias multe da nektaro, al kiu kolektiĝas papagoj kaj aliaj birdoj.

La “brasikarboj” (*Cordyline australis*) kreskas multe en la malsekaj kampoj, riverbordoj kaj arbaroj, kaj ofte atingas 17 m. La unuaj kolonianoj manĝis iliajn burĝonojn kaj florojn anstataŭ brasikoj. La floroj blankaj aŭ kremkoloraj havas dolĉan odoron, kiu allogas abelojn.

Sur la iro-reven-vojo mi ĉie trovis malaltajn arbojn de la skopario (*Leptospermum scoparium*) kun multaj blankaj floroj similaj al tiuj de la umeo; ili aspektas kvazaŭ tapiŝo de neĝo. La kolonianoj uzis la bonodorajn tigojn kaj florojn anstataŭ teo.


Kiam mi sidiĝis en la aŭto, la profesoro ordonis ke mi ligu min al la sidejo per sekuriga rimeno, kaj ni veturis en freneza rapideco de pli ol 80 mejloj. Ni baldaŭ revenis al Aŭklando kaj mi adiaŭis lin kun elkora danko.

Duno

Spinifex hirsutus (Graminaco)

cipero

maro



Malsanoj de la Digesta Aparato

(daŭrigo)

KURACADO PER KAROTOJ.

Tiu ĉi metodo, tre rekomendinda ankaŭ, konsistas el jeno : Antaŭ enlitiĝo laksiĝu vin kiel supre indikite. Poste dum 2-3 tagoj observu dieton el nur krudaj karotoj en kvanto laŭ via plaĉo ; kaj ĉiunokte dum la daŭro de la kuracado laksiĝu vin ree. Se tiu ekskluziva dieto el krudaj karotoj estas al vi tro teda aŭ peniga, aldonu iom da rostita aŭ nefreŝa sekala aŭ tritika integra pano.

KURACADO PER ALIAJ RIMEDOJ. 50 gramojn da pulvorigita rizomo de virfiliko (latine : *polystichum filix mas*) boligu en duonlitro da akvo ĝis ĉi tiu reduktiĝos al kvaronlitro. Trinku tion frumatene, ankoraŭ ne manĝinte ; kaj 2 horojn poste laksiĝu vin per natria aŭ magnezia sulfato aŭ per kasifoliaj folikloj (ne per ricinoleo en ĉi tiu kazo). Ripetu tiun procedon post unu semajno.

Oni ankaŭ povas enstomakigi 8 ĝis 10 gramojn da tiu pulvorigita rizomo de virfiliko miksita kun 150-200 gramoj da malvarma akvo (oni tute ne ĝin boligas en ĉi tiu kazo) frumatene, ankoraŭ ne manĝinte; kaj

post 2 horoj oni sin laksiĝas kiel supre indikite. Estas rekomendinde feki en fekujo plena de varma aŭ tepida akvo por ke la tenio ne rompiĝu pro sia propra pezo.

La ŝelo de la radiko kaj de la branĉoj de granatarbo ankaŭ estas efika tenioforpela rimedo. Muelu aŭ pecetigu 60 gramojn da tiu freŝa ŝelo, boligu ĝin mariabane en 750 gramoj da akvo ĝis ĉi tiu reduktiĝos al duonlitro, filtru ĝin, kaj trinku tion en 2-3 fojoj kun duonhora intervalo ; post 2 horoj, laksiĝu vin per 30 gramoj da ricinoleo.

Askaridoj (*Ascaris lumbricoides*), kiuj similas al lumbrikoj aŭ tervermoj povas estigi senapetiton (aŭ male, apetitegon), malbonan nutradon, ventran doloron, lakson, urtikarion, intestan gason, palpitation, sendormecon, epilepsion ; kelkfoje ankaŭ bronkiton, obstrukcon de la intesto aŭ de la koledoko, anemion, k.t.p. Jen la kuracado : Se ekzistas mallaĉo, kuracu ĝin unue. Manĝu abunde krudajn fruktojn kaj salatojn, speciale krudajn karotojn. Spinaco, kukumo kaj saŭrkraŭto ankaŭ estas vermoforigaj. Evitu albuminojn en

viaj manĝaĵoj dum la kuracado. Ĉi tiu daŭras komence 14 tagojn kaj baziĝas sur karotoj kaj ajlo. Fru-matene, antaŭ matenmanĝo, manĝu ĉiutage 2-3 krudajn karotojn. Ĉiunokte, antaŭ enlitiĝo, apliku pere de intesta sondilo profundan klisteron el ĵus elpremita suko de krudaj karotoj; oni povas ĝin miksi kun iom da apenaŭ tepida akvo aŭ prefere da dekokto de 3-4 bulberoj de ajlo ĝis atingi la tutan kvanton da enŝprucigota likvaĵo (250 ĝis 750 gramoj, laŭ la aĝo de la paciento). Du aŭ tri fojojn semajne, ĉe enlitiĝo nokte, laksigu vin per iu laksiga infuzaĵo. Post 14 tagoj ĉesu la kuracadon kaj observu la fekaĵojn dum kelka tempo. Se vi konstatas, ke ankoraŭ ekzistas askaridoj (analizo en laboratorio povas esti necesa), ripetu la supre indikitan kuracadon. La parazitportanto devas sin bani ĉiutage kaj ties subvestojn oni devas ĉiutage lavi aŭ prefere boligi por eviti reinfektiĝon.

Oksiuroj (*Oxyuris vermicularis*) videbliĝas en la fekaĵoj kiel moviĝemaj, maldikaj, blankaj kaj mallongaj fadenetoj. Samkiel la askaridoj, ili atakas ĉefe la infanojn. Sed dum ĉi tiuj loĝas en la maldika intesto, la oksiuoj ennestiĝas en ambaŭ ekstremaĵoj de la dika intesto: la cekumo kaj la rektumo. Dumnokte la femaloj migras eksteren por ovodemeti, kaj tiu migrado okazigas

intensan jukadon ĉirkaŭ la anuso. La infano tiam sin gratas, kaj tiamaniere li prenas sub la ungoj la parazitojn kaj ties ovojn, kiujn li poste portas al la buŝo, reinfektiĝante senĉeze. Tiu jukado kaj gratado povas kaŭzi dermatozojn, ekskoriaciojn, neŭrozon, nervozecon, sendormecon kaj eĉ perturbojn en la seksa sfero (onanismo), ĉefe ĉe infanoj. La oksiuoj povas invadi la vulvon kaj vaginon ĉe infaninoj, kaj la prepucion ĉe infanoj, kaŭzante inflamojn. Ili ankaŭ povas invadi la apendicon kaj estigi apendiciton.

Dum la kuracado, kiu daŭras 14 tagojn, la infano devas surmeti bankalsonon kaj gantojn dum la dormohoroj por eviti reinfektiĝon. Li devas sin bani ĉiutage kaj krome lavi sian anusan regionon ĉe enlitiĝo kaj ĉe ellitiĝo por elimini la parazitovojn. Li devas zorge lavi al si la manojn post fekado, kaj liaj ungoj devas esti mallongaj kaj puraj. Liaj subvestoj devas esti ĉiutage boligitaj. Ĉiunokte ŝmiru la ĉirkaŭanusan haŭton per iom da petrolo por malebligi la ovodemeton. Observu la saman supreindikitan dieton por askaridoj (manĝu abunde krudajn karotojn, k.t.p.), kaj laksigu vin 2-3 fojojn semajne, nokte ĉe enlitiĝo, per laksiga infuzaĵo aŭ ricinoleo. Ĉar la oksiuoj loĝas precipe en la rektumo, la klistero ne devas esti tiel profunda kiel por askaridoj;

uzu do komunan kanulon anstataŭ sondilo. Ĉiunokte apliku klisteron el 400-600 gramoj da sapa akvo aŭ da dekokto de cepo kaj ajlo aŭ da ĵus elpremita suko de krudaj karotoj miksitaj kun iom da akvo; aŭ 3 kulerplenojn da oficiala oksigenakvo miksitaj kun 400-600 gramoj da akvo (alternigu tiujn likvaĵojn).

La sekiĝintaj parazitovoj povas dissemiĝi sur la tapiŝoj, kurtenoj, litaĵoj, k.t.p., iĝante fonto de plua infektado. Por ilin malinfekti, uzu do elektran polvosuĉilon, kaj poste elmetu ilin al la sunaj radioj dum 2 horoj. Subvestojn, tualet- kaj littukojn boligu.

Eĉ kiam oni konstatas oksiurojn ĉe nur unu persono, oni devas konsideri la tutan familion kiel infektitan, kaj ĝin kuraci laŭ la supraj indikoj por certigi kompletan sukceson. Kompreneble la flegist(in)o, kiu flegas infektitan personon, devas skrupule kaj ofte lavepurigi al si manojn kaj ungojn.

Ankilostomoj (*Ankylostomum duodenale*, *Necator americanus*) similas al $\frac{1}{2}$ –2 centimetraj, flavetaj fadenetoj. Ties larvoj troviĝantaj sur la tero penetras tra la haŭton, plej ofte de la plandoj de la nudpieduloj, eniras en la limfan kaj sangan cirkuladon, alvenas al la pulmoj, bronkoj, laringo, stomako kaj finfine al la maldika intesto, kie ili

fiksiĝas kaj maturiĝas. Tiuj parazitaj kaŭzas gravan anemion, lakson kaj aliajn digestajn perturbojn, palecon, malfortecon, apation, malfacilan spiradon, k.t.p. Ĉe infanoj oni ofte rimarkas nervozecon, sendormecon, abdomenan ŝvelon, intestajn gasojn, koran dilatiĝon kaj edemon de la manoj kaj piedoj; ili kreskas malrapide kaj disvolviĝas nesufiĉe.

En regiono infektita de ankilostomoj nepre ne marŝu nudpiede. La necesejon zorge malinfektu per kalkosolvaĵo aŭ iu alia desinfektaĵo. La banejo kaj ties diversaj iloj, la vestoj, k.t.p. devas esti skrupule puraj. Uzu nur trinkeblan akvon por trinki kaj irigacii. Fruktojn, legomojn, salatojn, k.t.p. tre zorge lavepurigu. La loĝantaron oni devas instrui pri la meĥanismo de kontaĝo kaj la nepre necesaj antaŭzorgoj; krome oni devas ĝin ekzameni por individuigi la parazitportantojn kaj submeti ilin tuj al kuracado.

Observu la samajn dieton kaj kuracadon supreindikitajn por askaridoj. La anemion kuracu per abundaj krudaj fruktoj kaj salatoj kaj ties ĵus elpremitaj sukaj (speciale sukaj de krudaj karotoj kaj spinaco), kruda ĝermo de tritiko, maraj algoj, sekigita bierfermentilo, nuksoj, la ŝelo subtila pistita de ovoj, k.t.p. Prenu sunbanojn. Rekomencu vian laboron nur post resaniĝo.

Ameboj (*Entamoeba histolytica*) estas mikroskopaj parazitoj, kiuj kaŭzas sangomiksitan lakson, anemion, kojlaĵn ulcerojn, hepatajn abscesojn, k.t.p.

La profilaktikaj rimedoj kaj la dieto indikitaj por la aliaj parazitoj estas aplikeblaj ankaŭ ĉi tie. Krome vi faru la jenon :

Ĉiunokte, unu horon post vespermanĝo, apliku klisteron de 1 litro da apenaŭ tepida akvo pere de klisterilo kaj komuna kanulo, kaj feku. Post tiu intesta purigado, apliku pere de klisterpilko kaj intesta sondilo 20-25 centimetra profundan klisteron el unu kulerpleno da pura argilo (antaŭe sunumita dum 1-2 horoj) bone miksitaj kun glaso da apenaŭ tepida akvo. Metu kusenon sub viaj koksoj, kaj retenu tiun kuracan klisteron dum 15 minutoj en ĉiu el la sekvantaj pozicioj : sur la dekstra flanko, sur la dorso, sur la maldekstra flanko kaj sur la ventro ; sume unu horon. Poste deprenu la kusenon de sub viaj koksoj, kaj kuŝiĝu en via normala pozicio por dormi, retenante la kuracan klisteron ĝis la sekvanta mateno, se eble. Faru tion dum 20 sinsekvaj noktoj ; poste ĉesu. Por plifirmigi la kuracadon enstomakigu ĉiumatene, ankoraŭ nemanĝinte, 1 aŭ 2 kafkulerplenojn da pura argilo (antaŭe sunumita) bone miksitaj kun duonglaso da malvarma akvo.

Prefere preparu tiun miksaĵon antaŭtage nokte, kaj la morgaŭon matene remiksu ĝin kaj trinku. Infanoj prenunu duonan dozon. Ne timu uzi argilon por via kuracado. Ĝi estas tre efikoplena kaj tute sendanĝera, eĉ en interna uzado. Zorgu nur, ke la argilo estu tre pura, sen sablo kaj ŝtonetoj, prefere elfosita el la profundo (almenaŭ duonmetra) de la minejo.

Se post unumonata interrompo de la supremenciita 20-taga kuracado, ankoraŭ persistas la ameboj (analizo de la fekaĵoj en laboratorio estas necesa), ripetu la saman kuracadon dum aliaj 20 tagoj.

Ekzistas aliaj intestaj parazitoj de ni ne menciitaj, kiujn oni povas kuraci samkiel la de ni menciitajn. La supreindikita kuracado per argilo kontraŭ ameboj estas sukcese aplik-ebla ankaŭ al ĉiuj aliaj intestaj parazitoj.

Grava rekomendo al suferantoj de la digesta aparato : Ĉesu uzi drogojn kaj farmaciaĵojn, kiuj nur momente forigas la ĝenajn simptomojn koste de toksado de la organismo kaj pligraviĝo de la malsano. (fino)



La fantomo

Aŭtuna, malfrua nokta horo. En ĉiuj fenestroj de vilaĝaj kabanoj malaperis radietoj de petrola lampo, kuŝas en dolĉa ripozo infaneto, endormigita per ama rakonto de avinjo pri bela princino. De tempo al tempo aŭdiĝas nur, kiel revoko de gardistoj — hunda bojeto. Ĉio ŝajnas ripozi post laciga tago.

Meze de la vilaĝo situas pli gravaj konstruaĵoj. Tie ĉi en distanco de ĉirkaŭ 200 metroj troviĝas la plej signifoplenaj, konkurencaj instancoj; dia domo — la preĝejo kaj diboĉa domo — drinkejo. Ili estas spirito kaj animo de la vilaĝa vivo. Nun tamen, dum la unua trankvila dormas en ombroj de foliperdataj tilioj, la alia ardas de vivo kaj ĝojo.

Nubegoj de tabako kaj de du fulgantaj petrolaj lampoj malhelpas en unua momento ion vidi. Oni jam multon trinkis. Kelkaj kartludas, aliaj kverelas, fumas, kverelas, iu “brandbaritone” provas kantaĉi, aliaj ankoraŭ trinkas kaj aŭskultas aŭ pensas pri sia hundosorto.

En unu momento, kiam iomete trankviliĝis post unu temo, kaj nova ne estis ankoraŭ bone komencita, de

sur la kesto en angulo maljuna Luko kutime nomata “Urso” pro sia masiva staturo atente aŭskultis la 20-jarulon, kiu laŭdis sian kuraĝon.

“Aŭskultu, fileto!” — diris la “Urso”, leviĝante de sur la loko. “Ŝajne, alkoholaĵo faris cin pli heroo ol fakte ci estas” — en lia voĉo eksonis moka noto.

“Ho, ĉu vi opinias min fanfaronulo? ! Starigu taskon! Se nur estas en mia ebleco, mi certe plenuos. Mi eĉ diablon ne timas renkonti”.

“Diablon, ne diablon, sed”... rediris malrapide Luko iomete pensante, dume aliaj opiniante la aferon interesfariĝanta proksimiĝis al la interparolantoj. Fariĝis silente kaj per mistera voĉo la “Urso” komencis:

“Proksimiĝas noktomezo — horo de fantomoj. En la vilaĝo oni ĉirkaŭrakontas strangajon pri mortintaj Leono kaj lia edzino. Certe, ci kaj vi aŭdis tion. Ŝajnas la tasko inda cin, ĉu?”

La vizaĝo de Johano, ĉar tia estis nomo de la junulo, paliĝis, kaj en la okuloj oni povus rimarki bedaŭron.

“Oni diras, — daŭrigis Luko — ke

mortinto en ĉiu noktomezo eliras el la familia tombo, iras al la preĝejo, kie li dum unu horo arde preĝas por plimallongigi purgatorian tempon de la edzino, kiu ne lasas lin trankvile ripozi. Ci eĉ ricevos ankoraŭ de ni monpremion, se ci alportos lin ĉi tien, ĉu knaboj?”

De ĉiuj lokoj oni jesis, vivuis, aplaŭdis kaj volontigadis al la faro.

Iu prenis sian ĉapelon kaj kolektis la premion. Kolektiĝis rapide pli ol 1000 zlotoj. La drinkejmastro mem donis 100 zlotojn, kaj Luko eĉ 200.

Dum aliaj havis bonan amuzon, Johano sentis timon kaj korpremon, sed honoro ne permesis al li montriĝi timemulo, ĉar tiam nenian respekton li havus en la vilaĝo, neniu knabino volus paroli kun li. Nur ankoraŭ momenton li hezitis kaj akceptis la aferon. Ĉiuj ekkriis ĥore, eksonis tostopuŝoj. Proksimiĝis noktomezo. Johano ankoraŭ kruccsignis sin kaj ekiris. Kelkaj postrigardis, ĉu vere li iros al la preĝejo.

En Johano kreskis sento de timo, sed li iris rapide sen atento, kio povos okazi. Jam ne unu fojon li sentis sur sia persono lokan prestiĝon. Alveninte al la preĝejo, li stariĝis en ombro por bone povi rigardi la pordegon. Pasis eble du minutoj, kiuj ŝajnis al li strange longaj kaj ĉe la fortaj battoj de la koro, la preĝeja sonorilo anoncis

noktomezon — unu solan horon dum tagnokto en regado de spiritoj kaj fantomoj. Tuj ĉe la lasta, dekdua frapo, knare malfermiĝis la pordego kaj samtempe Johano ekvidis la konatan silueton de Leono, kaj sur la kapo streĉiĝis la haroj kaj animo “forkuris” en la piedojn. Li volis postiri Leonon, sed sentis, kvazaŭ estus najlita al la grundo kaj devis uzi ĉiujn fortojn por ekiri.

Enirante la preĝejon, li ekvidis, ke ĉiuj kandeloj misterflame duonlumis kaj ĉio ŝajnis vivi. Ĉe la ĉefa altaro li ekvidis figuron de Leono, kiu, tuj ion rimarkinte — fariĝis senmova. Malrapide proksimiĝis Johano varmege preĝanta, petante ĉiujn sanktulojn por helpo kaj promesadis neniam plu fanfaroni. En la preĝo, li petis ankaŭ pardonon de Leono kaj senkulpigis sin ke li devas pro honoro agi. Vidante, ke nenio malhelpas, ekpalpis la mortinton, ĉiam pli firme, prenis lin sur siaj ŝultroj kaj ekiris. La kadavro ŝajnis al li tre malpeza, do preskaŭ en kuro atingis la drinkejon, kie oni multon pri tio diskutadis.

En la momento kiam Johano aperis en la pordo kun la mortinto, ĉiuj konsterniĝis, tuj resobriĝis kaj mutiĝis.

“Jen li, la premio estas mia, kaj nu, vi povas lin mem forporti” — diris jam kuraĝe Johano — “pri tio ne estis

en la kontrakto”.

Ĉiuj volis kvazaŭ en proverba “musa truo” kaŝi. Ankaŭ Luko ne plu ŝajnis konveni por la kromnomo “Urso”.

“Johano” — diris malkuraĝe Luko — “brava, kuraĝa Johano, ni kolektos por vi ankoraŭ saman premion, nur tuj forportu lin”.

“Bone, akceptite, mi faros ankoraŭ tion, malkuraĝuloj” ! Kaj nun li turnis sin al drinkejmastro: “Glason da brando” ! En tiro li eltrinkis, surŝultrigis la mortinton kaj ekiris. Aliaj ekspiris.

Tiu mallonga distanco, kiun antaŭe Johano trakuris, ŝajnis nun ege longa. Ĉe ĉiu paŝo la kadavro ŝajnis pli peza. Kun granda peno, en “sepa” ŝvito li atingis fine la preĝejon. Eniris la preĝejon kaj pli facile ekspiris je la penso de sukceso. Alpaŝis la altaron kaj volis la mortinton starigi, sed. . . la kadavro estis lin alligita. Johano volis liberiĝi de ties manoj, sed Leono ekparolis :

“Vi faris kun mi la ŝercon, ci gajnis al tio la monon, do, se ci estas tiel kuraĝa, ci devas ankaŭ al mi helpi. Vi scias kiucele mi ĉi tien venas jam de du monatoj kaj mi ankoraŭ longe ne havos trankvilan ripozon ĝis mi nuligos purgatorian tempon de la edzino. Iru al mia edzino, kaj petu ŝian konsenton, ke mi ĉesu la preĝadon. Por ke ci ne

forkuru, mi algluas al cia korpo pecon da karno de mia korpo, kaj nun iru. Nian tombon ci facile trovos laŭ lumeto”.

Johano, ĝis nun nenion kapabla diri, ekiris, ĉar ne multe da tempo restis. Post kelkdek paŝoj atingis la tombejon kaj tuj rimarkis la tombon de Leono. La mistera lumeto faris la tombon travidebla, kvazaŭ ĝi estus el vitro. Senprokraste ekgenuis kaj petis tie kuŝantan la edzinon, sed tuj la mortintino kontraŭstaris tiel akre, ke Johano perdis tutan kuraĝon. Li ekstaris kaj kuregis al Leono, ĉar tiu ŝajnis alli homeca.

“Mi lasis min porti en la drinkejon, kaj nun ci devas tion repagi al mi. Iru, ĉar baldaŭ estos la unua”.

Denove li kuris al la tombo, multe pli varme petis, sed ankaŭ tio ne kortuŝis la sensentan kadavron. Haste denove kuris al Leono, opiniante la viron pli komprenema.

“Mi jam preĝos anstataŭ vi, mi pagos la gajnitan premion por la sankta meso . . .” uragane petegis la junulo.

“Diru tion al ŝi, kaj rapidu, ĉar restas nur 5 minutoj. Se ŝi liberigos min, tiam mi povos cin. Aliamaniere ci devos morti”.

La malfeliĉa junulo, kun lastaj espero per finiĝanta forto atingis la tombon kaj plorante petegis, prome-

(daŭrigo al P. 147)